LANGUAGE

# The Hope of Esperanto

*A made-up tongue celebrates its centenary*

In 1887 Ludovic Zamenhof, a multilingual Polish oculist, published a book introducing a new language under the pseudonym Dr. Esperanto, meaning "one who hopes." Zamenhof fervently wished that his invented tongue would become the world's second language. Although that hope is still unrealized, nearly 6,000 zealous Esperantists—the largest gathering ever—from as far away as Japan and Brazil will assemble this week in Warsaw to honor Zamenhof on the occasion of the 100th birthday of his language. They will do so with a variety of events—all in Esperanto, of course. There will be poetry readings and plays, plus a visit to Zamenhof's hometown of Bialystok.

Many people assume that Esperanto is one of the youngest dying languages, a verbal experiment that has simply not worked out. In fact, Esperantists can be found all around the world. Estimates of their total number vary widely, from 1 million to 8 million or more. Marjorie Duncan, 65, a retired Sydney, Australia, schoolteacher, believes the movement needs more young people. But, she says, they would "rather drive cars or go surfing."

At a glance, Esperanto seems simple enough. The language has only 16 easily memorized rules of grammar—no exceptions at all—and a basic vocabulary built from mostly Indo-European roots. Experts claim that virtually anyone can learn Esperanto in 100 hours or less. But for some, numerous suffixes and prefixes may complicate matters. The no-frills system can handle many idiomatic phrases from other languages, and even has its own earthy expletives, such as *diable* for hell and *merdo* for excrement.

The use of Esperanto probably reached its peak in the 1920s, when idealists embraced it as one small step toward peace. Some intellectuals viewed it as a solution to the language problem, which they felt contributed to political misunderstandings; in some British schools youngsters were actually able to study Esperanto. But interest died down after World War II, partly because governments did not support the language, partly because English was fast becoming the lingua franca of business and travel. Esperantists have urged the United Nations to adopt their language, but the organization has its hands full with six official ones (English, French, Spanish, Arabic, Chinese and Russian).

Humphrey Tonkin, president of the Rotterdam-based Universal Esperanto Association, says that the *Lingvo Internacia* is popular in lands whose languages do not travel well. Examples: Iran, Brazil, the Netherlands and the Scandinavian countries. A sizable concentration of Esperantists is found in Japan, where the language has sometimes been used for discussions by scientists who speak different languages. China uses Esperanto to facilitate communication between speakers of its northern and southern dialects and supports an active publishing program. Many masterpieces of literature have been translated from various languages into Esperanto, including the Koran and some of Shakespeare's plays. But Mary Davies, an Esperantist who runs a hotel in Heysham, England, complains, "We don't have any light reading."

When they travel, many Esperantists wear lapel pins shaped like green stars that signal them as Esperanto speakers, in hopes of meeting fellow speakers. They also call up comrades-in-conversation and exchange cassette tapes by mail. Says Scotsman William Auld: "I've gotten drunk in every country in Europe with Esperanto speakers." In any language, an avid conversationalist can work up quite a thirst for a wee drop of *viskio*. **—*By J.D. Reed.***

***Reported by Edward M. Gomez/New York and Paul Hofheinz/London***




**Spreading the word in China**

LINGVO

# La Espero de Esperanto

*Kreita lingvo festas sian centjariĝon*

En 1887 Ludoviko Zamenhof, multlingva pola okulisto, publikigis libron prezentantan novan lingvon sub la kaŝnomo Doktoro Esperanto.* Zamenhof arde deziris ke lia inventita lingvo fariĝu la dua lingvo de la mondo. Kvankam tiu espero estas ankoraŭ nerealigita, preskaŭ sesmil fervoraj esperantistoj—historie la plej granda renkontiĝo—tiel foraj lokoj kiel Japanio kaj Brazilo kolektiĝos ĉi-semajne en Varsovio por honori Zamenhof je la okazo de la centa datreveno de lia lingvo. Ili celebros per diversaj aranĝoj, ĉiuj en Esperanto, kompreneble. Okazos poeziaj legadoj kaj teatraĵoj en Esperanto plus vizito al la hejmurbo de Zamenhof, Bjalistoko.

Multaj homoj supozas, ke Esperanto estas unu el la plej junaj mortantaj lingvoj, vorta eksperimento kiu simple ne elsukcesis. Fakte, esperantistoj estas troveblaj tra la tuta mondo. Taksoj pri ilia tuta nombro multe varias, inter 1 milionoj kaj 8 milionoj aŭ pli. Marjorie Duncan, 65-jara, emerita instruistino el Sidneo, Aŭstralio, kredas, ke la movado bezonas pli da gejunuloj. Sed, ŝi diras, ili preferus "veturigi aŭtojn aŭ iri surfumi."

Je unua rigardo, Esperanto ŝajnas sufiĉe simpla. La lingvo havas nur 16 facile memoreblajn gramatikajn regulojn—sen iuj ajn esceptoj—kaj bazan vortaron konstruitan el plejparte hindeŭropaj radikoj. Fakuloj pretendas, ke preskaŭ iu ajn persono povas lerni Esperanton en cent horoj aŭ malpli. Sed ĉe kelkaj homoj, multnombraj sufiksoj kaj prefiksoj eble komplikos aferojn. La senornama sistemo ankaŭ kapablas trakti multajn idiotismajn frazerojn el aliaj lingvoj kaj ja havas siajn proprajn sukoplenajn sakraĵojn, kiel ekzemple diable kaj merdo.

La uzo de Esperanto eble atingis sian pinton en la 20aj jaroj, kiam idealistoj alproprigis ĝin kiel unu etan paŝon al paco. Kelkaj intelektuloj rigardis ĝin kiel solvon al tiu lingva problemo kiu, laŭ ili, kontribuas al politikaj miskomprenoj; en kelkaj britaj lernejoj, gejunuloj reale povis studi Esperanton. Sed la intereso malfortiĝis post la Dua Mondmilito parte ĉar registaroj ne subtenis la lingvon kaj ankaŭ parte ĉar la angla rapide fariĝis la komuna lingvo de komerco kaj vojaĝado. Esperantistoj instigis Unuiĝintajn Naciojn adopti ilian lingvon, sed la organizaĵo jam havas plenajn manojn pro ses oficialaj lingvoj (angla, franca, hispana, araba, ĉina kaj rusa).

Humphrey Tonkin, prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo, diras, ke la lingvo internacia estas populara en landoj kies lingvoj ne bone vojaĝas. Ekzemple: Irano, Brazilo, Nederlando kaj la skandinavaj landoj. Konsiderinda koncentriĝo de esperantistoj ankaŭ troveblas en Japanio, kie la lingvo estis foje uzata por diskutoj inter scientistoj, kiuj parolas malsamajn naciajn lingvojn. Ĉinio uzas Esperanton por faciligi komunikadon inter parolantoj de siaj nordaj kaj sudaj dialektoj kaj subtenas aktivan eldonprogramon. Multajn literaturajn ĉefverkojn oni tradukis el diversaj lingvoj en Esperanton, inkluzive la Koranon kaj kelkajn teatraĵojn de Ŝekspiro. Sed Mary Davies, esperantistino kiu estras hotelon en Heysham, Anglio, plendas, "Ni ne havas ian leĝeran legaĵon."

Kiam ili vojaĝas, multaj esperantistoj portas insignojn en formo de verdaj steloj por indiki sian esperantistecon, esperante renkonti samlingvanojn. Ili ankaŭ telefonas al kunkonversaciantoj kaj interŝanĝas kasedojn perpoŝte. Diras skoto William Auld: "Mi ebriiĝis en ĉiu lando de Eŭropo kun Esperanto-parolantoj." En ĉiu ajn lingvo, avida konversacianto povas elfabriki imponan soifon je eta guteto de viskio. **—*De J.D. Reed. Raportita de Edward M. Gomez/Novjorko kaj Paul Hofheinz/Londono***

*In Esperanto, the accent falls on the next-to-last syllable of each word. J is pronounced like y, ĉ like ch, ĝ like j, ŝ like sh and u like oo.